

600–699 paŝoj – 25 baladoj

& Odo al Johano Gutenberg, la inventinto de preso:	378	& Dektria numero:	402
& Disputo de akvo kun vino:..	380	& Mortis Grabowski:	404
& Napoj:	382	& Stafan stalservisto:	406
& Magdalena balado:.....	384	& Sur vojo de l' vivo:	409
& Amikoj, fratuloj:.....	386	& Balado pri Pineli:	411
& Je ŝia nomfesto:	388	& Malbonŝanco:	413
& Senlaborulo:.....	390	& Balado pri brigo Blua Birdo el Hull:.....	415
& Recepto por fari bonajn versaĵojn:.....	392	& Marinjo Magdon:	417
& Vespero kun junaj rusoj:.....	394	& Stinjeto stalservisto:	419
& Ŝi estas gaja:	396	& Laŭ ĉies plaĉo:.....	421
& ABC-libro:	398	& Pala procesio:	423
& Prologo:	400	& Kion la vivo alportis:.....	425
		& El Ahasvero de amo:	428

& Odo al Johano Gutenberg, la inventinto de preso:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 602 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Ján Hollý. El slovaka tradukis Magda Šaturová-Seppová (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (/mi miso somi re reerefa fami; mi miso soomimi re refa fami; mi dore miidodo Ti TiTi doLa; So SoSo doTi;

(#Rekantaĵe: mi miso somi re refa fami; mi miso somi re refa fami; mi dore mido Ti TiTi doLa; So Sodo Ti i)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 Kiu vin, glora vir', laŭdi
sufiĉe, ; glori kapablas, estimi
vin scias ; Plenadekvate por
ege utila ; Via sci-frukto?

(×: **Frapas tajparo, premas
paperon ; Kapaj kaj frazaj
venas literoj ; Libroj
presiĝas en alta stako ;
Frapas tajpar'.**)

'2 Kiu aŭtor' ja sub volbo ĉiela
; faris pli grandan, valoran
inventon ; Por la utilo de febla
homgento, ; Kiu entute!

'3 Kio ja, space flugadi facile,
; Ŝvebi tra silka aero al suno? ;
Kiam al tero sekura post kurte
; Sinkos ni ree!

'4 Kio ja, el la kanonaj
paftuboj ; Tondre elsendi
detruan pafadon? ; Se ĝi nur
morton, kruelajn aferojn ;
Faras damaĝe!

'5 Vi la unua malkovris la
arton ; Kiel kreaĵojn de homoj
sciplenaj ; Taŭge en form' de
presitaj folioj ; Prese eldoni.
.....

'6 Dia invento! Antaŭe cent
jarojn ; Kion cent manojn
skribistaj pretigi ; Devis, ja
tion nun eĉ ne post jaro ; Unu
kapablas.

'7 Etaelspeze de tiam nun ĉiu ;
Arton akiras por sumo
negranda, ; Koron nobligas kaj
mense surpaŝas ; Ŝtupon pli
altan.

'8 Ĉiu ekscii jam povas facile,
; Kion per tuŝo de flamo dieca
; Kreis poetoj, aŭ de
sciencistoj ; Mensoj ekkonis;
.....

'9 Aŭ kiajn de la aferoj
sekretojn ; Metis en lumon
naturaj sciencoj; Kiaj en
landoj antikvaj kaj novaj ;
Agoj okazis.

'10 Por ĉi donac' vin famigas
Danubo, ; Reĝa Tiberio kaj
riĉa Tamizo, ; Rejno dankema
kaj Sejno blueca, ; Tajo
potenca.

'11 Dankas Vistulo kun Volgo
grandega; Maro Kaspia; vin eĉ
mem Bajkalo, ; Nilo mem
gloras kaj gloras vin hindoj ;
Ĉiuj en kantoj.

'12 Son' vianoma ĉiam
vastiĝados ; Kie la suno
juneca eliras, ; Kie vespere sur
maran surfacon ; Olde ĝi
sinkas;

'13 Kie de norda frosteg'
neplugata ; Tero rigidas; kaj
kie sud-ardo ; Ege vastegajn
sablejojn albrulas ; Per sia
flamo;

'14 De homokuloj dum ne
malaperos ; Tatroj slovakaj
kaj dum ne de loko ; Steloj
falegos, en fajro komuna ;
Mond' ne pereos.)

& Disputo de akvo kun vino:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 604 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis J. M. Dilherr. El germana en slovakon tradukis Daniel Sinapius-Horčíčka kaj el slovaka tradukis Eduard V. Tvarožek (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Olavo Rajdistrozo.>

(#Melodio:

<2,3:4> (

/mi mi mi mi /so solfa mi mi; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do Ti; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o

)×18)+

(& Strofoj:

<Akvo:>

'1 Se laŭ aĝo kaj merito

(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)

iu volus en disputo

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!**
; /**Iru plankon, dancu kun**
/**granda em'!**)

'2 saĝa vinon, akvon juĝi,
vino certe devus fuĝi,

'3 ĉar antaŭ ol vin' aperis,
Dio akvon jam preparis.

<Vino:>

'4 Se l' utilo kaj la forto
estu l' bazo de l' raporto,

'5 pli ol akvo vino bonas:
multajn ĝojojn ĝi ja donas,

'6 ĝi naskigas la gajecon,
kreas dormon, amikecon.

<Akvo:>

'7 Tamen, diru, ĉu en vero
kreski povus eĉ vinbero,

'8 se ne estus pluvo bona
kaj malvarma ros' matena?

'9 Sen ĝi ne prosperus herbo
..... kaj sekiĝus ĉiu arbo.

<Vino:>

'10 Kiel sklavo sinjorinon
akvo devas servi vinon.

'11 Ja ne havas pura akvo
multe davivig-kapablo;

'12 bezonatas pli da forto
por protekti kontraŭ morto.
.....

<Akvo:>

'13 Kiu nur por akvo vervas,
..... saĝon sian plen-konservas,

.....

'14 sed por multaj tro da vino
..... estis trista, aĉa fino:

'15 tro da vino, senrefute,
prenas la prudenton tute.

<Vino:>

'16 Kiu trinkas ĝin modere,
..... tiun helpas vino vere -

'17 ne ŝveligas ĝi la ventron,
..... donas al ni viv-kontenton.

.....

'18 Ĉiu rajtas gaja esti,
vivo-ĝojon manifesti.)

& Napoj:

< Rekante 25 el 47 batoj por strofo, entute 611 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo. Klarigo (*): Napoleon' Bonaparte, fransa regnestro kaj granda militisto.>

(#Melodio:

<:47> (

/do dore doTi LaSo FaMi; do doTi dore mifa so so; do dore doTi LaSo FaMi; do doTi dore mire do do;

(#Rekantaĵe: fa fami refa mi mire domi re redo Tire domi so; domi so; fa fami refa mi mire domi re redo Tire do do o)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 /Jes! Dio estas saĝa viro ;
Kaj kreis ĉion ĝustacele. ; Tre
evidente, kun admiro ; Ni tion
vidas senkandele!

(×.; **Kreskas la herbo en mia
cerbo, kredas mi ne
kompreni vin ; en memor' ;
Grasas la floroj, pasas
odoroj en granda verda
kampo.)**

'2 Jen por la fiŝoj li komence ;
Fluigis akvon en riveron ; Kaj
por la birdoj bonintence ;
Necesan kreis la aeron;

'3 Jen por kreskigo de l'
terpomoj ; Li faris pluvon kaj
sunhelon ; Dum li samtempe
al la homoj ; Donacis pluv-
kaj sunombreton!

'4 Li ellaboris speciale ; La
homojn per zorgema mano, ;
Pripensis ĉion ĝisdetale ; Laŭ
vere tre genia plano:

'5 Por manĝa aŭ malmanĝa
celo ; Li faris, – diras mi
senmoke, – ; Perfekte majstre,
sen modelo, ; En- kaj el-iron
ĝustaloke!

'6 Al viro li por amindumo ;
Donacis ĉarman junedzinon ;
Kaj kiel ombron apud lumo ;
Samtempe kreis... bopatrinon!

.....

'7 Sed foje Dio, kvankam
ruza, ; Embarasiĝis miakrede,
; Kaj kvin minutojn li konfuza
; Restadis preskaŭ
senrimede... ..

'8 Ĝi estis antaŭ jam jarcento,
; Li tiam faris, en kolero, ; Pro
puno al la homa gento, ;
Militan fajron sur la tero.

'9 Sed tiu fajro ne sukcesis, ;
Ne flagris ĝi laŭ di-intenco, ;
Kaj estis klare, ke necesis ;
Rimedo arda pli potenca.

'10 Kaj Dio pensis en medito:
; "Jam ne utilos la petrolo, ;
Por tia fajro al incito ; Ne plu
sufiĉas mia Volo!

'11 Ĉu helpos eble roz-oleo? ;
Ĉu graso suko de l' olivo? ; Aŭ
ĉu alia naŭz-oleo ; Revokos
fajron al plenvivo?

'12 Ha! Jen la solvo, estas
klare! ; En mia kel' troviĝas
napoj ; Amase, kiujn ĉiujare, ;
Tribute sendas miaj papoj.

'13 El tiuj napoj mi science ;
Nun premos taŭgan la oleon!"
; Li teren sendis, konsekvence,
; Tuj bonaparte
NAPOLEON*!!

& Magdalena balado:

< Ripete 27 sed rekante 20 el 41 batoj por strofo, entute 615 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4422. Mezepoka kristana legenda kanto pri pentema pekulino el la domo de Simon. El sveda tradukis Martin Strid (2016).>

(#Melodio:

<1,7:41> (/dodo TiTi LaLa dodo redo mi i; so mimi fa re mi i; do domi sodo dodo redo Ti Ti; So domi so dodo Ti La a; so mifa sodo dodo redo Ti Ti; So domi so dodo Ti La a;) $\times 15$)+

(&Strofoj:

'1 Magdalena iris en arbara frond'. (\times ; **Brilis hodiaŭ sun'**) (; Tie savanton sian ŝi renkontis. (\times ; **En arbareto la verda**)) \times

'2 Magdalena falas antaŭ sia savant'. "Trinku amikecon el mia blanka man'."

'3 "Mi ne povas trinki ĝin el via man' ĉar kun multaliaj estis vi kompan'."

'4 Unun vi infanon havis kun via patr'. Ĝin ĵetis vi en la granda mar'.

'5 Duan vi infanon havis kun via frat'. Ĝin ĵetis vi sub la granda pont'.

'6 Trian vi infanon havis kun la pastro. Tiam vi pekis en pleja drasto.

'7 Vi pardonon alie ne povas akiri ol en arbaro sep jarojn iri.

'8 Vi ne liton havu en alia lok' ol kuŝi sur alta monta rok'.

'9 Vi nenion havu alian por manĝ' ol maĉi ŝelon de pina arb'.

'10 Nenion alian trinki havu vi ol suĉi sukcon de tilifoli'."

'11 Magdalena iris en arbara frond'. Tie savanton sian ŝi renkontis.

'12 "Magdalena, liton kiel ŝatis vi?" "Kiel molanaslanugo estis ĝi."

'13 "Magdalena, kion pensis vi
pri manĝ'?" "Manĝo mia
estis kiel reĝa plad'."

'14 "Magdalena, kion pensis vi
pri trink'?" "Trink' mia
estis kiel ruĝa vin'."

'15 "Magdalena, jen finiĝas
via pun'. En la ĉielon vi
paŝu nun."

& Amikoj, fratuloj:

< Ripete 16 sed rekante 5 el 32 batoj por strofo, entute 628 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4440. El sveda tradukis Martin Strid (2015).>

(#Melodio:

<:2> (

(a;Mi /Mi MiMi /La LaLa /Mi FalSo /Fa a; /MiMi MiMi /Re
ReDi /LA DiMi /Re; DiRe /Mi i /Fa a;Mi /Mi RelDi /Mi i; /MiMi
SiLa /Tildo TiLa /SiLa Tido /La

)×15)+

(&Strofoj:

'1 A/mikoj, fra/tuloj kon/sili2s
/sin ; /kiel fornup/tiĝu ĉi/jare
fratu/lin'. ; En la /ro/zo ;
kon/sili2s /sin ; /kiel
fornup/ti2ĝu ĉi/jare fratu/lin'.

'2 "Volas al vi doni ni (:
reĝfilon por edz' ; li havas pli
da or' ol riĉa Roland da
terpec'.")

(×:; **En la rozo** ;)

(,: reĝfilon por edz' ; li havas
pli da or' ol riĉa Roland da
terpec'.)

'3 Sabate kaj dimanĉe eliris
mesaĝ' ; lunde kaj marde
spektiĝu la omaĝ'.

'4 Merkrede kaj ĵaŭde miksiĝis
da vin' ; vendrede kaj sabate
drinkiĝis je kulmin'.

'5 Ili drinkis dum tagoj, ili
drinkis dum du ; ne volis
novedzino iri al la litsitu'.

'6 Ili drinkis dum tagoj, ili
drinkis dum tri ; ne volis
novedzino vidi al la litlini'.

'7 Tiam envenis malgranda
mara bub' ; kaj estis li vestita
en blua la jup'.

'8 Ekstaris li ĉe tablo kaj tiel
diras ; "Mi vidas nur la
mastojn kiuj tie iras.

'9 Mi vidas nur la mastojn kaj
bluajn kaj brunajn ; kaj riĉa
Roland mem sur tio staras
tribune."

'10 Kaj ili ĉiuj lasis tiujn
vortojn pasi for ; sed la
junulino tenis la vortojn en
memor'.

'11 Emas junulino eliri tra la
pord' ; kaj kuras ŝi la vojon al
mara la bord'.

'12 Ŝi kuris sur ŝtonoj kaj sur
piedfingroj ; sed bone sin
gardis de bluaj ondadingoj.

'13 Kaj ili prenis en ŝipon ŝin ;
invitis ŝin trinki da medo kaj
vin'.

'14 "Dio min gravis de
infanetoj ; mi fermis la pordon
kaj for de tie tretis."

'15 "Mi vidas sur via eta
blanka fingro ; ke tie ĝis
hieraŭ ne estis nuptoringo."
.....

'16 "Mi vidas sur via orflava
harar' ; ke tie ĝis hieraŭ ne
nuptokrono staris."

'17 "Mi vidas je via neĝblanka
mam' ; ke ili ne konsolis al iu
etinfan'."

'18 Sidiĝas junulino ĉe
Rolanda flank' ; ne sentas ŝi
malĝojon, ne sentas ŝi da
mank'

'19 Kuŝiĝas junulino ĉe
Roland intime ; vekiĝas ne
antaŭ ol en sepreĝa reĝimo.
.....)

& Je ŝia nomfesto:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 630 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Julio Mangada Rosenörn (Versajaro, Madrid 1922). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por & Adiaŭa vorto de la reĝino.>

(#Melodio:

(#: <:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a (#Rekantaĵe: mi3re doTi rere mi; mi3re doTi rere mi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a a;)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 "Ne forgesu la nomfeston ; Mian. Certe vi komprenos ; Mi deziras; jes, vi venos; Mi esperas la ĉeeston."

(×:; **Bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto.**)

'2 Tagon tiel leterdiris ; Vi al mi. Mi ne forgesis; Koron mian dir' karesis, ; Kaj profunde mi sopiris.

'3 Estis dolĉa la ĉeesto: ; Mi tutkore vin gratulis; Sento mian koron lulis ; Dum la nia apudesto.

'4 Tiun senton por esprimi, ; Mi decidis tujan agon ; Ho, la feliĉegan tagon! ; Jes, antaŭen! Kial timi?

'5 En vendejo tuj mi mendis ; Korbon da tre belkoloraj ; Floroj; kun esprimoj koraj ; Ilin al vi mi jam sendis.

'6 Ĉu vi sentis la kontenton ; Pro la faro, mi ne scias; Sed mi tamen opinias, ; Ke vi ĝuis la prezenton.

'7 Nur estimo via restas ; Al mi9; estas ĝi sufiĉa ; Al la koro sentoriĉa ; Tiel, kiel mia estas !

'8 La feliĉaj tagoj pasis! ; ju pli dolĉa la kunesto, ; Des pli mala la foresto; En doloron ĝi min lasis!

'9 Des pli granda la doloro! ;
Senton devas mi sufoki, ; Min
ne devas vin alvoki ; Spite de
dezir' de l' koro;

'10 Se mi estus ja kuraĝa;
Povus ion mi vin sendi; Sed vi
rajtus prave plendi ; Se mi
estus, do, malsaĝa.

'11 Nu, malgaja mi min sentas
; Pro situacio mia; tamen, tre
korambicia ; sento min
senĉese tentas;

'12 Min instigas al la ago, ;
kiun vi tuj malpermesis, ;
Kiam senton mi konfesis. ;
Ha, neforgesebla tago!,

'13 Ne esperu, ne, la ĉpenton;
Kvankam akra la doloro, ; Ne
sufokos mia koro ; Sian
grandan puran senton... ..

'14 Kion sendi, do, hodiaŭ? ;
Nu; "Feliĉojn" nur mi diras, ;
Dum la kor' dolorsopiras, ; ĉar
vi diris ja "Adiaŭ"!

'15 Venu via la admono, ; Mi
trankvile ĝin atendas;
Kvankam vi certege plendos...
; Ankaŭ venos la pardono!

'16 Ĉar vi estas grandanima ;
Vi ha! devas do kompreni... ;
Mi ne povas min deteni, ; Pro
la mia sent' senlima!

'17 Sed, jes, havas mi detenon:
; Mian koron eĉ oferi, ; Kaj ne
plu al ĝi toleri ; Rompi ĝian la
katenon.

'18 Tre malgajaj la sopiroj ;
Estas de la koro mia! ;
Brunulin' tre simpatia, ; Tiaj
ankaŭ miaj diroj!... ..)

& Senlaborulo:

< Rekante 35 el 53 batoj por strofo, entute 636 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis kaj komponis Claude Piron.>

(# Melodio:

<:53> (LaTi doTi domi mado Tido TiLa Ti Ti i; redo Tido TiLa TiLa FaFa LaFa Mi Mi i;

(#Rekantaĵe: (MiLa LaLa LaTidoTi LaLa; Tido reTi Tidoredo TiTi; ReMi FaRe ReMi FaRe FaFa LaFa Mi Mi i;) \times h)

) \times 12)+

(& Strofoj:

'1 Kiom longaj estas tagoj al senlaborulo, ; kiu antaŭ tridek tagoj manĝis lastan kukon.

(\times :: **Trinku sukon, oni diris al mi, ; manĝu kukon, oni diris al mi, ; trinku sukon, manĝu kukon, vi fariĝos forta. ; Trinku sukon, oni diris al mi, ; manĝu kukon, oni diris al mi, ; trinku sukon, manĝu kukon, vi fariĝos bela.**)

'2 Venas uloj, iras uloj, longe min rigardas, ; montras mane, nekomprene; dono ne okazas.

'3 Jen riĉuloj sur la strato iras tre trankvile, ; mi la monon

ĝojoportan serĉas malfacile.

'4 Sur la strato kun malĝojo kion eblas fari? ; Antaŭ pordo de kafejo ĉu nur sola stari?

'5 Ĉu sur strato mi plu staru aŭ ĉu mi eniru? ; Kiam estos ene mi, nu, kion mi eldiru?

'6 Ĉu sin montru la malĝojo ĉe mi sur vizaĝo? ; Ĉu bonulo venos porti kukon al la tablo?

'7 Al kelnero sen kolero mi paroli devos ; kompreneble, kaj ĉu eble kafon mi ricevos?

'8 Ĉu komprenos la kelnero ke mi estas senmona? ; Se li

donos kafon al mi, mi fariĝos
ĝoja.

'9 Aŭdu, aŭdu, geamikoj,
voĉon de la frato, ; donu
kukon, donu sukon, kune kun
la kafo.

'10 Jes, gefratoj, vi komprenu,
kiom mi malriĉas ; donu iom
da poŝmono, al mi nun
sufiĉas.

'11 Donu trinkon, donu
manĝon, donu multe, multe, ;
kaj mi donos mian foton al vi
dank-salute.

'12 Kaj per tio jen mi finas la
malĝojan kanton, ; vi min
aŭdis, vi komprenis, havu
mian dankon.)

& Recepto por fari bonajn versaĵojn:

< Rekante 36 el 71 batoj por strofo, entute 639 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Aŭtunaj floroj, Lingvo Internacia, 1912). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

/MiMi LaLa SoSo LaLa doTi La So; dodo TiTi dodo rere sofa mi do; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; mimi redo TiLa TiTi doTi La Mi; dodo TiTi dodo rere sofa mi do;

(#Rekantaĵe: Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do; mi redo TiLa Ti doTi La Mi; Mi La So oLa doTi La So; do Ti do ore sofa mi do o)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 Vi do volus scii, kiamaniere ; oni lernas skribi versojn esperantajn? ; Kiel rimojn trovi, kiel belan senton, ; kiel lerni ĝuste uzi la akcenton ; por versaĵojn fari ĉarmajn, elegantajn?

(×: **Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi ; kaj en la ve2rsoj mi2n kaŝi ; Emas mi poeme paŝi ; per piedoj plankon draŝi.**)

'2 Nu mi al vi, kara, kun plezur' respondos ; kaj fidindan donos al vi eĉ recepton, ; kiamaniere kaj sen embaraso ; vi rapide lernos rajdi sur Pegaso ; kaj en redakcioj trovos bonakcepton.

.....

'3 Vi unue devos studi la libreton ; pri la versfarado kaj pri la rimaro, ; kaj por ke vi agu ĝuste kaj laŭ plano ; vi aĉetos al vi veston el ŝaflano, ; por vin bone ŝirmi kontraŭ nazkataro.

'4 Vi ja scias certe, ke dum la printempo ; oni la plej ofte

faras versojn ĉarmajn, ; ke
printempe tiklas la plej multe
plumo, ; sed ke nin minacas
ankaŭ malvarmumo, ; tial mi
eĉ ŝuojn rekomendas varmajn.
.....

'5 Kiam la libreton vi
trastudas, nune ; iru en
naturon, eble en arbaron, ; se
nur eble iru tien post krepusko
; kaj sidigu tie vin sur ŝton' aŭ
musko ; kaj tralegu ree bone la
rimaron.

'6 Vi ekvidos certe flugi la
birdetojn ; kaj en musko ankaŭ
kreski junan floron, ; ĉarman
lekanteton, eble eĉ galanton, ;
kaj de arboj aŭdos vi nun
dolĉan kanton, ; kiu ĝojoplena
faros vian koron.

'7 Bone eĉ memoru, ke sen
sun' kaj steloj ; estas poezio
preskaŭ nelegebla, ; sed
samtempe skribi pri belega
luno, ; pri brilantaj steloj kaj
pri varma suno ; eĉ en
Esperanto estas aĵ' ne ebla.

'8 Bone estas ankaŭ, se en la
arbaro, ; kiun vi elserĉos,
plendos najtingaloj ; kaj se
rivereto plaŭdos en proksimo,
; tiam ne komponi estus vere
krimo ; kontraŭ ĉiuj homoj,
kontraŭ la ĵurnaloj.

'9 Sed plej bone estas, se vi
kun knabino ; brak' ĉe brako ie
en arbaro vagos; ĝi instigas
ĉiam en plej alta grado ; al la
poezio kaj al versfarado, ;
kion la gazetoj al vi bone
pagos.)

& Vespero kun junaj rusoj:

< Ripete 48 sed rekante 8 el 64 batoj por strofo, entute 640 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de & Major Brak'.>

(#Melodio:

<1,6:4> (DolRe /Mi Mi MiRe MiFa /So o lMi;

(#Rekantaĵe: FaMi /Re Re Re DoRe /Mi ilDo Do;)

DolRe /Mi Mi MiRe MiFa /So ldo lSo; Fa /Mi Mi Re Re /Do o o;

DolMi /So So La La /So o o; DolMi /So do Fa Fa /Mi i lRe;

DolRe /Mi Mi MiRe MiFa /So ldo lSo o;Fa /Mi Mi Re Re /Do o o

)×10)+

(& Strofoj:

'1 Po2st vodkonokto kaj kun vi2n' (×::; **Mili /tamtam tam, mili/ti2stoj** ;) (': ni2 pensis, ke ni banu ni3n ;) (': kaj naĝis do en lag'.) (': ka2j naĝis do en lag' ; ka2j naĝis do en la2g'.) (': ni2 pensis, ke ni banu ni3n ;) (kaj naĝis do en lag'.)

'2 Soldatorusoj sen kalson' naĝadis laŭte kun reson'. ; Mi timis en imag'.

'3 Sed Donjo restis plu sen tim' kaj same nude banis sin, ; revenis sen zigzag'.

'4 Ŝi drinkis tiom, kiom mi, ni ege lacis pro l' ebri' ; finiĝis gaja tag'.

'5 Tagmeze venis oficir', surprize granda kavalir', ; al ni eĉ kun donac'.

'6 Matrjoŝkon li transdonis nin kaj dankis plu pro la inklin', ; pro ĝoj' kaj noktaŭdac'.

'7 "Ĝis iam", diris li kun rid', "kaj dankon plu pro via fid', ; por bela tag' en pac'."

'8 Kaj kiam ili estis for', Matrjoŝko restis por memor', ; la adiaŭdonac'.

'9 La rusoj iris for de ni, hejmlanden, sed sen iluzi', ; al tre necerta viv'.

•
'10 La fin' de amikecbrakum'
..... kondukis nin eĉ al
cerbum', ; al romp' de l'
perspektiv'.)

& Ŝi estas gaja:

< Rekante 23 el 53 batoj aŭ 29 el 59 por strofo, entute 583 paŝoj dum 6 aŭ 641 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo. Alternative uzeblas tiuj de Dektria numero.>

(#Melodio:

(#Nova: <1,5:43> /mi mi mimi mi mimi re doTi La La;Ti do dodo re dore mi mi; mi mi mimi mi mimi re doTi La La;Ti do dodo Ti doTi La La; :30

(#Rekantaĵe: mimi mi re doTi La a;Ti dodo re re mi mi; mimi mi rere doTi La; LaLa LaTi dodo TiTi La La a)) :23

?

(#13a: <:59> /mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi; mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi;

(#Rekantaĵe: mimi rere do dodo dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi; mimi rere do do dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi i))

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Ŝi estas ankoraŭ malgranda infano, ; Ŝin ĉiuj dorlotas kaj amas; En ŝia vizaĝo, floranta per sano ; Gajeco senzorga nur flamas.

(×:

(&Nova: **Mian manon tenu nun ; en firma ligo kune ; kaj neniam rompiĝu ĝi ; eĉ se dure frapas nin fortuno.)**

?

(&13a: **Vidu, suno levas nun sin por nova tago ; kaj ne zorgas niajn agojn ; kaj ĝi superpasos nin ĝis la vespero ; dum klopodas ni sur tero.)**

)

'2 Jen jaroj forpasas. Ŝi lukse disfloras, ; Ŝin sorto renkontas afable; Ŝi estas tre gaja, neniam ŝi ploras, ; Kaj vivon pasigas agrable.

'3 Rigardu: jen rajdas en cirka
areno ; Konata al vi belulino, -
; Ŝi saltas, ŝi dancas sen deva
konveno, ; Ĉar estas ŝi gaja
fraŭlino!

'4 Kaj ĉiuj laŭtege kriante ŝin
laŭdas, ; Je ŝia talio admiras, ;
Ŝin multe elvokas, senfine
aplaŭdas, ; Al ŝi ornamejon
eniras.

'5 Jen domo gajega. En ĝia
salono ; Belegaj virinoj
promenas, ; En tiun-ĉi domon
pro vino kaj mono ; Tre multaj
fraŭlinoj alvenas.

'6 Jen vidu: ekfalas sur molan
kanapon, ; En brakoj de iu
sinjoro, ; Belega fraŭlino. Jen
levas ŝi kapon ; Kaj ridas en
bona humoro.

'7 Ĉu vi ŝin ekkonis? Tre gaja
fraŭlino! ; Pasie ŝin kisas
sinjoro, ; Karesas kaj donas
pokalon da vino, - ; Ŝi trinkas
kaj... ridas el koro!

'8 Post tio forflugas apenaŭ
nur jaro, ; Kaj ŝin mi denove
ekvidis, - ; sed kie? Sur kota
drinkeja ŝtuparo ; Ĝi staris
malsobra kaj ridis.

'9 Foriĝis jam ŝia beleco
vizaĝa, ; Nenio antaŭa jam
restis. ; Ŝi min ekrigardis kun
vido malsaĝa ; Kaj kvazaŭ
kontenta ŝi estis.

'10 "Vi eble per brando regali
min volas?" ; Demandis ŝi min
arogante: ; "Ĉar vidu...
hodiaŭ... mi... iom petolas!" ;
Kaj ŝi ŝanceliĝis ridante.

'11 Kaj ĉiam ridanta, kaj ĉiam
kontenta, ; Vivanta pro mono
kaj vino, ; Senzorga, senhonta,
sensaĝa, sensenta, - ; Jen vivo
de gaja virino!

& ABC-libro:

< Rekante 11 el 23 batoj, entute 644 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Nenjo Rimanto (Chorleywood, jaro ne indikita). Baladigis Martin Strid (2016) per simpligata melodio polsa sveda el Rättvik kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:23> (# Tre strömmingar:

/do MiFa ReeFa;Fa Mi DoMi SooSo;So do Tido reedo;do do LaFa SoSo;

(#Rekantaĵe: So doTi dore do LaSo La; FaMiFa SoFa ReTI Do o)
)×28)+

(&Strofoj:

'1 /A por azeno, ; rapide ĝi iras. ; Al ĝi mi parolas ; kaj "Hi, ha" ĝi diras.

(×: **Per alfabeto venas la vort' ; Bone kunmetu por komfort'.**)

'2 B por bovino, ; tre bone ĝi agas. ; Por sia nutraĵo ; per lakto ĝi pagas.

'3 C por la cigno, ; ĝi estas tre bela. ; Al sia idaro ; ĝi restas fidela.

'4 Ĉ por ĉevalo, ; ĝi estas utila, ; Kaj portas la homojn ; per peno facila.

'5 D Dromedaro. ; En seka dezerto ; Ĝi kuras rapide ; kun multe da lerto.

'6 E elefanto. ; Tre forte ĝi staras. ; Per korpo kaj rostro ; laboron ĝi faras.

'7 F por la foko; sur roko ĝi sidas, ; Sin banas en maro, ; kaj fiŝojn ekvidas.

'8 G por gorilo. ; Ĉi tie ĝi sidas, ; Sed iam ĝi ludas, ; kaj tiam ni ridas.

'9 Ĝ por ĝirafo. ; Tre alta ĝi estas; Plej alta el ĉiuj ; bestegoj ĝi restas.

'10 H por la hundo, ; la besto konstanta. ; Ĝi estas kunulo ; fidele amanta.

'11 Ĥ helonio, ; ĝi loĝas en maro, ; Sed iam kaptiĝas ; de fiŝkaptistaro.

'12 I por infanoj, ; infanoj ni estas; Sed ĉiam infanoj ; ni certe ne restas.

'13 J jaguaro, ; jen besto Brazila. ; Al la leopardo ; ĝi estas simila.

'14 Ĵ por ĵokeo, ; rapida rajdanto; De kuraj ĉevaloj ; li estas amanto.

'15 K por la kato, ; tre mola la vesto; Ĝi sidas proksime, ; kaj estas dombesto.

'16 L por leono ; kun nobla aspekto, ; De bestoj la reĝo, ; laŭ homa elekto.

'17 M por la muso, ; malsata besteto. ; Ĝi loĝas komforte ; en sia nesteto.

'18 N najtingalo ; kun voĉo belsona. ; Ĝi ravas la homojn ; per kanto beltona.

'19 O por omaro. ; Pinĉilojn ĝi havas; Sed ili omaron ; el naso ne savas.

'20 P por la porko. ; La nazon ĝi puŝas ; En trogon por manĝi, ; kaj poste ĝi kuŝas.

.....

'21 R por la rano; ĝi saltas rapide, ; Kaj multajn insektojn ; ĝi kaptas avide.

'22 S por la struto, ; grandega kaj bela. ; Ĝi kuras zigzage ; en lando tre hela.

'23 Ŝ por la ŝafo ; kovrita de lano. ; "Me, Me," ĝi diradas ; al sia infano.

'24 T por la tigro, ; en granda ĝangalo, ; La homoj ĝin timas ; sur monto, en valo.

'25 U por la urso. ; Rigardu! Sen ĝeno ; Ĝi tie promenas ; en besto-ĝardeno.

'26 Ŭ por ŭa estas. ; Ŭa, ŭa, jen la krio ; De ĉiu bebeto ; ĝenata de io.

'27 V por la vulpo. ; Por ŝteli ĝi venas, ; Mortigas kokinojn, ; kaj kelkajn forprenas.

'28 Z por la zebro, ; la stria ĉevalo. ; Arbare ĝi loĝas, ; sed ne en la stalo.)

& Prologo:

< Rekante 15 el 23 batoj por strofo, entute 644 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (/LaaLaTi dodo TiTi LaLa; doodore mido; TiTi LaLa;
(#Rekantaĵe: LaaLaTi dodo TiTi LaLa; doodore mido TiSo LaLa;
miimifa mire dore mido Ti La a))×28)+

(&Strofoj:

'1 Mi foje, iel, malvarmumis ;
kaj pri la vivo ; ekcerbumis.

(×:; **Estu nun ĝoja kaj
survoja ; kaj ĉiutage vivu
age ; Poste ripozu kun ni en
la danco.)**

'2 Kaj pri la bestoj, ; pri la
homoj, ; pri la objektoj, ; pri la
kromoj.

'3 Kaj pri la arto, ; politiko, ;
pri la bonfarto, ; pri l' taktiko.
.....

'4 Tre ete pensis ; mi pri
floroj, ; simile ankaŭ ; pri la
moroj.

'5 La tempo fluis ; malrapide ;
dum mi enuis ; invalide... ..

'6 Se venus al mi ; nur vizito, ;
min prikonsoli ; en la lito!

'7 Kaj mi suspiris ; pro sopiro
; ludante rolon ; de martiro.

.....

'8 Subite tie - ; la similo! ;
mem de EZOPO ; propra filo!

.....

'9 Mi donis al li ; fortan
brandon ; por veki lian ;
propagandon.

'10 Jam eĉ ne eblas ; doni
notojn, ; kiel li ŝutis ;
anekdotojn.

'11 Nu, pri la bestoj, ; pri la
homoj, ; pri la gigantoj, ; pri la
gnomoj.

'12 Kaj pri la floroj, ; pri
moralo, ; eĉ pri birda ;
karnavalo.

'13 Galimatio ; tre abunda ;
estis vizito ; tiu lunda.

'14 Kun intereso ; fajre arda ;
sekvata estis ; dua, marda!

'15 Li venis ankaŭ ; ĉi
merkredon, ; se doni volas ; vi
la kredon.

'16 Ke li ne vakis ; ĝuste
ĵaŭde, ; mi dankis ĝoje ; kaj
aplaŭde.

'17 Li ne ellasis ; eĉ
vendredon, ; daŭrigis kun mi ;
fabel-bredon.

'18 Mi jam sabate ; ŝvite
naĝis; dimanĉe li ĵus ;
forvojaĝis.

'19 Dum la semajno, ; en sep
tagoj, ; ni iĝis bonaj ;
kamaradoj.

'20 hazarde ankaŭ ; je la sepoj
- ; viciĝas niaj ; rakontetoj.

'21 Se vi suspektas - ; ĉe
diablo - ; ke eble mankas ; iu
fablo,

'22 kontrolon faru ; per
kalkulo; mi en sciencoj ; estas
mulo.

'23 Apenaŭ skribi ; mi ja
spertas, ; nur en eraroj ; prete
lertas.

'24 Kaj Esperanton - ; kia
blago! ; ellernis mi en ;
duontago.

'25 Pro tio ankaŭ - ; povas esti
- ; tre eblas ion ; ne digesti!
.....

'26 Negrave tamen: ; laŭ
ezopo ; elekton donas ; la
multopo.

'27 Mi povas krome ;
rekomendi ; ĉi-ĉion ankaŭ ;
ree vendi.

'28 Fin-fine, nu vi ; povas certi
- ; fabelojn ĉiu ; scias verki!
.....)

& Dektria numero:

< Rekante 29 el 59 batoj por strofo, entute 649 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:59> (

/mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi; mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi;

(#Rekantaĵe: mimi rere do dodo dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi; mimi rere do do dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi i)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 Li estas krimulo!... Mallevis li kapon, ; Pri vivo pasinta pensante, ; Malsupren al brovoj surŝovis li ĉapon, ; Kaj iras, per ĉenoj sonante.

(×: **Vidu, suno levos tuj sin por nova tago ; kaj ne zorgas niajn agojn ; kaj ĝi superpasos nin ĝis la vespero ; dum klopodas ni sur tero.**)

'2 Vi pensas kredeble, ke estas li homo? ; Ho, vane! ĝi estas malvero: ; Li estas nur ia vivaĵo sen nomo, ; Cifero, "dektria numero".

'3 Piedojn kaj manojn katenoj turmentas, ; Animon plenigas doloro, ; En korpo malsana malvarmon li sentas, ; Sopiron grandegan en koro.

'4 Li forte laciĝis, Ripozi li volas, ; Kaj jen li sidiĝas sur tero. ; "He, vi!... sonas krio: vi ree petolas?! ; Vin levu, "dektria numero"!

'5 Kaj ree li paŝas, per ĉenoj sonante, ; Kaj ree sopiras sen fino, ; Pri celo de sia vojaĝo pensante, ; Pri domo, infanoj, edzino.

'6 Rapide traflugas en lia
memoro ; Pentraĵoj de vivo
mizera. ; Kaj ree en korpon
penetras doloro, ; en koron -
turmento infera!

'7 En malliberejo malluma,
malpura, ; Senkulpe ŝlosita li
estis, - ; Kaj tie en stato
malbona, terura ; Kvin jarojn
longegajn li restis!

'8 Li jam humiliĝis al juĝo
malvera, ; Kaj nur liberiĝon
avidis, - ; Sed vane: subite lin
sorto severa ; Denove kruele
jeridis.

'9 En malliberejo fariĝis
ribelo, - ; Al ĝi ankaŭ lin oni
igis. ; Sed oni neniom aliris ol
celo, ; Por ĉiam nur sin
pereigis.

'10 Kaj jen rezultato! Mallevis
li kapon, ; Pri vivo pasinta
pensante, ; Malsupren al
brovoj surŝovis li ĉapon, ; Kaj
paŝas, per ĉenoj sonante.

'11 Vi kredas sendube, ke
estas li homo? ; Ne kredu, - ĝi
estas malvero: ; Li estas nur ia
vivaĵo sen nomo, ; cifero,
"dektria numero".)

& Mortis Grabowski:

< Rekante 30 el 59 batoj por strofo, entute 649 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1921) "je la naskotago de Zamenhof". Baladigis Martin Strid (2016) per nova melodio kaj rekantaĵo ĉerpita el Sinjoro Tadeo.>

(#Melodio:

<:59> (/fa fafa mimi faafafa mimi redo mimi; fa fafa mimi faafafa mimi fami rere; mi mimi fafa mimi mi mimi redo mimi; fa fafa mimi faafafa mimi redo mimi;

(#Rekantaĵe: fami re mido dodo TiTi dore mimi; fami re mido doododo fami re mi mi; fami re mido dodo TiTi dore mimi; fami re mido doododo Tire do La La)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /Ho, rimoj Esperantaj, nun tintu kun esploro, ; Tra l' mondo portu grandan doloron voĉo via, ; Ĉar mortis via Majstro grandpova kaj genia, ; Per kiu vi pleniĝis de vivo kaj sonoro.

(×: (; **Lando de infaneco restos por ĉiamo, ; Sankta kaj pura, kiel unua ekamo.**)×2)

'2 Ho, Muzo Esperanta, en la angul' vi sidis, ; En vestoj senornamaj, al Cindrulin' simile, ; Li vestis vin per silko, vin perlornamis brile, ; Kaj prenis vin ĉe mano, kaj vin solene gvidis.

'3 En halon de la Arto, en templon de la Belo, ; Sur via lir' li streĉis arĝentsonorajn kordojn, ; Kaj li agordis ilin, ke frapu vi akordojn ; Pli muĝajn ol tempesto, pli dolĉajn ol mielo.

'4 Via patron' li estis, de li vi lernis iri, ; De li vi lernis flugi kaj svingi vin ĝisalte, ; Portate de la ritmo, facile, danco-salte ; Parnason de Popoloj vi povis venkakiri.

'5 Alarmis li: Tagiĝas! Por gajno de trofeo ; Batalon iru, rimoj! Akiru novan gloron! ; Kaj ili kun triumfo alportis la trezoron: ; Jen Esperante revas jam sinjoret' Tadeo!

'6 Kaj vi ektuŝis korojn kaj koroj ĝermis florojn! ; Printempo de poemoj en nian rondon venis, ; Kaj ĉiu versofloro lin benis kaj solenis: ; Honorojn al la Majstro, ho gloron kaj honorojn!

'7 Ho Muzo, kvazaŭ birdo, se ĝin la frostoj tuŝas, ; Vi kun flugiloj lamaj funebras, mute, plore, ; La silkon kaj la perlojn deŝiras vi dolore, ; Ĵetite en angulon liuto via kuŝas.

'8 Ho, Muzo Esperanta, do ne sidadu mute! ; Se nun pro viaj larmoj eĉ malstreĉiĝis kordoj, ; Ekfrapu ilin tamen, eksonu la akordoj ; Obtuze, surde, ĝeme, funebre surliute.

'9 Doloron kaj funebrom sonigu, kantu krie, ; Pri la kruela bato de l' senkompata sorto, ; Ekmuĝos ĉiu sono ja kun milobla forto, ; Ĉar eĥos ĝin tra l' mondo la frataj koroj ĉie.

'10 Kaj se la kant' funebra forlarmis kaj forbruis, ; Relevu la flugilojn, denove ekflugiru, ; Ektuŝu novajn korojn, instigu kaj inspiru, ; Kiele vin la Majstro dum sia viv' instruis,

'11 Ke rimoj Esperantaj ektintu kun sonoro! ; Nur ili povas inde lin glori kaj memori, ; Nin li instruis verse ekridi, verse plori, ; Do estas ĉiu nova rim' ja lia nova gloro!)

& Stafan stalservisto:

< Rekante 23 el 31 batoj por strofo, entute 651 paŝoj dum 8 minutoj, aŭ rekante 19 el 28 batoj por strofo, entute 588 paŝoj dum 9 minutoj. Norda Kantaro #2505. El sveda tradukis Kukoleto (1993). Jen tri versioj de melodio. Al melodio #A adaptis Martin Strid. '4 Per tiu strofo kutimas finiĝi la ĝenerala versio de la kanto. '16 Brandujo. '20 Tabue estas tro laŭdi. '21 Aŭ "patron".>

(#Melodioj:

(

(#A: <1,5:31> /LaLa dodo TiSi La; dore mi rere mi; LaaLaLa dodo TiSi La; Ti dore mido Ti La h; f:doSo MiSo SoSo do; rere mi;fa mire doTi dore mido Ti La a) ?

(#Sveona:; <1,1:28> /LaLa LaSi Lado mi3;do LaLa doLa La Si; TiiTiTi rere TiTi do; LaLa doLa La Si; LaLa LaSo dore mi; fa3mi redo TiLa doTi; Ti i La a) ?

(#Malunga: <1,2:28> /dodo SoSo dore mi3;mi soso lala so mi; soososo lala soso mi; mimi redo La So; dodo SoSo dore mi; soso lala sofa mifa re e do o)

)×21)+

(&Strofoj:

'1

(&A: /Stafan estis stalservist' ;

(×:; **Tenu vin, ho ĉeval'!** ;)

akvis ĉevalojn siajn kvin

(×:; **je tiu stelo blanka ; Tag' ankoraŭ estas for, ; estas for, ; sed steloj de ĉieldeĵoro ; brilas.)**

)

?

(& Sveona kaj Malunga: /Stafan estis stalservist'

(×:; **volonte ni nun dankas ;)**

akvis ĉevalojn siajn kvin ;

(×:; **por la stelo blanka ; Tag' ankoraŭ estas for ; steloj de ĉieldeĵoro ; brilas)**

)

'2 Koloraj estis du je ruĝ'
bone servis sen penfuĝ'
'3 Koloraj estis du je blank'
..... ne estis intersimilo mank'
.....
'4 Plejbonĉevalon je pomgriz'
..... mem rajdas Stafan en
ĉemiz'*
'5 Pre ol kriis eĉ la kok'
Stafan jam en stala lok'
'6 Pre ol venis suno nur
bridon kaj orselon sur
'12 Nun kristnaskas ĉiu dom'
..... kandeloj kaj picearom'
'13 En ĉiu domo nun kristnask'
..... daŭros ĝojo ĝis la pask'
'14 Fajro nun en ĉiu forn'
jula kaĉo kaj la pork'
'15 Nun venas ni al via bien'
..... demandas, ĉu ni kantu jen
.....
'16 Amata patro en lignej'
al ni el ujo* donu plej
'17 Amata panjo ĉe la forn'
da pork' nin donu kaj el korn'
.....
'18 Se estas ene servistin'
leviĝos kaj lumiĝos ŝi
'19 Se ŝi ne lumigos ĝis sufiĉ'
..... ni nomos ŝin bovleda piĉ'
.....

'20 Bonnokton, dankon, kaj en
pac' ĉar iom bonis la
donac'*

'21 Bonnokton, dankon al
matron'* sufiĉe bonis via
don'

& Sur vojo de l' vivo:

< Rekante 25 el 41 batoj por strofo, entute 656 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Edmond Privat (Tra l' silento, Letchworth 1912). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj sveda polka melodio kaj rekantaĵo kiel por En kinematografejo.>

(#Melodio:

<:41> (o;so /soososo soososo soofiso laaso;so miimimi miimimi miiremi faami;mi reerere TiiSoTi reerere TiiSo;Ti; reerere miirere dooTiTi LaSo;

(#Rekantaĵe: SoLaSoFa MiSo do ore; miimimi remi fa mi; rere TiiSoTi rere TiiSoTi; rere mire doTi LaSo; SoLaSoFa MiSo do ore; miimimi fami re do)

)×16)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 Sur vojo de l' vivo vaginte tre sola ; Dum jaroj bruemaj de l' knaba juneco, ; Kaj multe plorinte sen vorto konsola ; Dum sonis ridad' el apuda gajeco,

(×:; &Rekantaĵo: **Flugu la balada vorto ; alte ĝis la plafono ; Tondre draŝu2 plankon paŝu2 ; Sentu, ĉu en ĝi risorto ; Flugu la balada vorto ; alte ĝis la plafono.**)

Tagon mi renkontis voje ; La rigardon de princino, ; Tuŝis mian manon foje ; Dolca mano de fratino.

(×:; &Rekantaĵo)

'2 La manon mi kaptis kaj premis tremante. ; El miaj okuloj ŝi ploron ĉesigis, ; Kaj sulkojn de l' frunto forigis kisante. ; Ni manon en mano la vojon daŭrigis.

Blue brilis la ĉielo; Ĉie floris la ĝardenoj. ; Por la haroj de l' anĝelo ; Kreskis rozoj kaj jasmenoj.

'3 Sur vojo de l' vivo nun
dolĉa kaj bela ; Ni, kvazaŭ du
cignoj sur blua rivero, ;
Malpeze glitadis al revo ĉiela,
; Dum harpoj kantadis pri l'
ama mistero.

Pura ŝajnis tuta mondo, ; Bona
ĉiu, bela ĉio. ; Ĉirkaŭ ni
dancadis rondo ; De petaloj el
lilio.

'4 Ni revon mirindan
komencis sen limo ; Pri lando
eterna de paco kaj ĝojo; kaj
kanton de nia komuna animo ;
Plej pure ŝi ritmis laŭlonge la
vojo.

Niajn rozojn ŝi disdonis ; Al
lacegaj vojirantoj, ; Kaj
infanojn ofte kronis ; Per
kronetoj el diantoj.

,&2:

'5 Sur vojo de l' vivo nun
vagas mi sola, ; Senzorge al
kie la tempo min blovas; Ĉar,
kvankam min celus eĉ vorto
konsola, ; En aĝ' mia nuna mi
vivi ne povas.

Haltis mia koro voje ; Ĉe la
tombo de l' princino, ; kiu
donis al mi foje ; Dolĉan
manon de fratino.

'6 La tagon, en kiu ŝi haltis
kun larmo ; kaj blankan la
manon forŝiris el mia, ; Mi
kial ne povis en morta
malvarmo ; Ŝin sekvi sub
teron al tombo glacia?

For de l' tomb' en nuna horo, ;
Min disrompas per tirado ;
Malantaŭen rememoro ; Kaj
antaŭen plu-vivado.

'7 Sur vojo de l' vivo, pro kia
mistero ; Eĉ amo nur estas
pruntaĵo momenta? ; Ĉielon ni
trovas kaj perdas sur tero, ;
Kaj blovas ankoraŭ la tempo
turmenta.

Tamen ĉesu, plendo mia, ; Se
antaŭen vokas devo. ; Kantu,
harpo melodia, ; Pri la land' de
nia revo;

'8 Ĉar iam ni revon komencis
sen limo ; Pri lando eterna de
paco kaj ĝojo; Sed kanto de
nia komuna animo ; Kun voĉo
karega perdiĝis sur vojo.

Kaj vagadas nun fantome ;
Mi, kun floroj en la manoj ;
Por disporti ŝianome ; Al
laculoj kaj infanoj.)

& Balado pri Pineli:

< Rekante 25 el 73 batoj por strofo, entute 657 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis? El itala tradukis? Gianfranco Molle. Baladigis Martin Strid (2015) per nova rekantaĵo kun melodio.>

(#Melodio:

(So do /mi mi mi /mi fa so /la so o /o; fa mi /re di re /re so fa /fa mi i /i; So do /mi mi mi /mi fa so /la so o /o; fa mi /mi re mi /so fa Ti /do o o /o;

(#Rekantaĵe: Sodo /mi mi mi /mi re; mi /fa fa fa /fa mi; fa /so so so /So La; TiTi /do do do /do Ti i)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 En Mi/lan' estis /varma ves/pero/ ; Estis /varma, tre /varma ve/tero/ ; "Kapo/ralo, mal/fermu fe/nestro/n" ; Eta /puŝo: Pi/neli ne /plu/.

(×.; **Kama/rado Pi/neli ha/zarde ŝan/celis ; fe/nestron el/falis, kapo/ralo fa/talis.)**

'2 "Policestro, mi estas senkulpa ; Mi jam diris kaj ade rediras ; Anarĥio signifas ne bombojn ; Sed justecon en la liberec'".

'3 Ne fabelu, kulpulo Pineli ; Via kara kunulo konfesis ; Nur pro li la atenco sukcesis ; Kaj helpinto ja estas nur vi.

'4 Vi mensogas alkrias Pineli ; Kamarado ne ĵetis la bombon ; Ĉar farintoj de ĉi-hekatombo ; Estas mastroj kaj ne proletar'.

'5 Nu, atentu, kulpulo Pineli ; Ĉar ĉi-ĉambro jam plenas je fumo ; Se vi pluas jen estas fenestro ; Kvar etaĝoj, ne temas pri ŝerc'.

'6 Oni murdis lin ĉar
kamarado ; Kaj ne gravis de li
senkulpeco ; Anarĥio de krim'
estas speco ; Diris fia polic-
komisar'.

'7 Post ĉerko tri mil kamaradoj
; Hisas alten batalan ni flagon
; Ĉi-vespere jen estas la ĵuro ;
Ke ne haltos tiele la lukt'.

'8 Policestro kaj kunpolicanoj
; vi mortigis al ni kamaradon ;
Nur por kaŝi ŝtatan masakron ;
Sed plej akra de ni estos venĝ'.
.....

'9 En Milan' estis varma
vespero ; Estis varma, tre
varma vetero ; Kaporalo
malfermu fenestron ; Eta
puŝo: Pineli ne plu.)

& Malbonŝanco:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 665 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:35> (

/Lami mifa mire TiTi; fafa lafa mire TiTi; domi mire doTi LaLa;
SoSo SoSo doTi La La;

(#Rekantaĵe: mi mi mi i;fa mire doTi La a; fa fa la fa mi re; mi mi
mi i)

)×19)+

(&Strofoj:

'1 En la vilaĝet' Simuris ; Estis
granda sensacio: ; Kun azeno
enveturis ; Kolportisto Emilio.

(×: **Frap', frap', frap' ; Lin
venis sur la kap', ; Estis li
senkulpa, ; Frap', frap',
frap'.**)

'2 Kaj dum li negocojn faris ;
En la domoj nun sen peno, ;
Sole sur la vojo staris ;
Veturilo kaj azeno.

'3 La lernantoj alrapidis, ; Ĉar
ja estis ĵus tagmeze. ; Ili kriis,
ili ridis ; Kaj rigardis nun
senĉese.

'4 Ili per diversaj faroj ; Nun
ĉikanis la azenon, ; Ili tiris lin
je l' haroj ; Kaj tintigis ĝian
ĉenon.

'5 Flanke sed knabeto staris, ;
Kiu tute ne petolis, ;
Ĉikanaĵojn li ne faris, ; Ĉar li
nur rigardi volis.

'6 Jen la kolportist' revenis, ;
Kaj la knaboj lin ekvidis; Ili
tuj la librojn prenis ; Kaj
kriante forrapidis,

'7 La knabeto sed atendis, ;
Ĉar rigardi plu li volis. ; Tute
ne li timon sentis, ; Ĉar li
fakte ne petolis.

'8 Sed la viro alrapidis ; Kaj lin kaptis sen kompato; Ĉar aliajn li ne vidis, ; Punis lin li per vang-bato.

'9 La maljusta vangofrapo ; Sed la knabon tre teruris, ; Kaj li kun ruĝega kapo ; Tuj en la lernejon kuris.

'10 Volis li rapide iri ; Al sinjor' la instruisto ; Kaj plendante al li diri, ; Ke lin batis la vendisto.

'11 Sed ĉar li doloron sentis, ; Ĉar li estis afliktita, ; Li nenion plu atentis ; Dum kurad' la senhezita.

'12 Trans ŝtuparon li rapidis, ; Kapon li antaŭen tenis; Sed la pastron li ne vidis, ; Kiu ĵus malsupren venis.

'13 Kaj li puŝis senatente ; Kontraŭ l' pastro sian kapon, ; Kaj ricevis sammomente ; Li de l' pastro vangofrapon.

'14 "Ho, atentu vi pli bone! ; Tute blinde vi nun iris!" ; Per kolera voĉ' admone ; Jen al li la pastro diris.

'15 Plenĉagrene, konsternite ; Li nun en la ĉambron iris, ; Al la instruist' rapide ; Per singulta voĉ' li diris:

'16 "Ho sinjor', la pastro batis ; Sur ŝtupar' min dum alveno, ; Kvankam mi ne petoladis ; Kontraŭ tiu ĉi azeno."

'17 Tuj post kiam tiel plendis ; Li malgajan sorton sian, ; Li sur sia vango sentis ; Jam fortegan baton trian.

'18 "Ne parolu tiel stulte ; Kaj atentu pri konveno, ; Kaj ne nomu vi insulte ; Vian pastron je azeno!"

'19 Se la sorto persekutas, ; Devas cedi homa forto. ; Kiel ajn eĉ hom' kondutas, ; Ĉiam venkas lin la sorto.)

& Balado pri brigo Blua Birdo el Hull:

< Rekante 31 el 61 batoj por strofo, entute 671 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4480. Verkis Evert Taube (1929). El sveda tradukis Martin Strid (2010) kaj per disdivido de strofoj donis en la melodio lokon por nova rekantaĵo (2016). Tiu ŝipo vere ekzistis sed ne pereis. Klarigoj (*): '1 Hull, urbo je angla orienta marbordo. ; Soten, fjorda golfo je sveda okcidenta insularo. ; Antaŭkristnaska tago de jaro 1872. '2 Stiriston oni povas ŝnure fiksi al rudro por ke forta ŝtormo ne forlavu lin de ferdeko. ; Smögen, insulo kaj vilaĝo en Bohusleno. '3 Hållö, insulo kun lumturo. ; Middlesborough, angla havenurbo. '4 Anoj de pereanta ŝipo lumigas torĉojn por alvoki helpon. '6 Savboato alproksimiĝu de malventa flanko por ne frakasiĝi kontraŭ pereanta ŝipo. ; Vokis per forta ĝoja voĉo. '7 Metafore pri vizaĝaj trajtoj kaj vidkapablo.>

(#Melodio:

<1,4:61> (

LaTi /do dodo do redo do3lTi TiLa Ti; LaTi do dore do TiLa La a; LaTi do Tido re dore mi rimi fa; SoSo fa fafa mi lriri mi i;

(#Rekantaĵe: fami re doTi do TiLa Ti TiTi Ti; fami re fami re riri mi i; dore mi mire do remi fa3mi fari mi; LaTi do dore do TiLa La a h))×11)+

(&Strofoj:

'1 Estis /Blubird' el Hull*,
estis Blu2birdo, brig', ; kun
brajlitaj topveloj en sku' ;
neĝoŝtorma ĉe Suten* kun
glacia rig' ; julvespere en
se2pdek du*.

(×: **Hurlas vento kaj muĝas
la maro en ŝtorm' ; Frapas**

**ondoj sur ŝipo kaj ŝer' ;
Paŝu plankon endome
sekure en la ĉen' ; Hurlas
vento kaj muĝas la mar'.**)

'2 – Ŝnuru l' svedon al rudro*,
li scias je bras', ; vokis
ŝipestro, – Nova deĵor'! ; kaj
Karl Stranne el Smegen*

ŝnuriĝis al rudr' ; de Blubird',
pereo2nta for.

'3 Glimis Holoj-lumturo* tra
bli2ndŝprucoj lin ; de
ventflanko tra densa neĝpluv' ;
kaj en malvento Smegen, kun
hejmo, patrin' ; novleter' lia de
Midelsbru'*.

'4 – Nu, ĉu, Karl, preteriros ŝi
jen? – Ne, ŝipes;tro, ni torĉu*,
finiĝis vojaĝ'. ; Estas Holoj
triborde, ondrompo en
malvent', ; – Ĵetu ankrojn!
Boatojn al naĝ'!

'5 Sed ŝi ne staris plu.
Pretigi2tan boat;on ondrompoj
forprenis al mar'. ; – Kredas
mi, diris Karlo, eliris jam
pat;ro renkonte, mi fidas al
patr'.

'6 – Jen boato malvente*, 'stas
patro – Ni jen! ; Patro mia el
Smegen! Ha lo! ; – Jen boato,
li kantis*, jen ili, saltu en, ;
ĉiuj viroj, li savos nin do!

'7 Estis aglo*, vikingo, la
Stra2nne-aĝul' ; julvespere en

sepdek du, ; prenis brandon
distilan el ŝrank' en angul' ;
ŝiprompitojn oferti je ĝu'.

'8 – Kiu nomo de l' ŝipo?
demandis li dum ; drinkojn
verŝis en pintglasojn naŭ. ; –
Brigo Blubirdo – prenis li
dekan glason, bum! ; Ĝin
frakasis al planko kun plaŭd'!
.....

'9 – Ĉu Blubirdo, ŝipestro,
Blubi2rdo el Hull? ; Dio, kie
'stas do mia fil'? ; Kie l' knabo,
ŝipestro, pro nia savul'! ;
Mortsilentis sur benk' ĉiu vir'.
.....

'10 Ŝtormĉapelon deprenis
nun la2nte l' aĝul' ; – Ŝparu
panjon, ŝipestro, ĉi nokt;e. Ne
nomu la brigon en mara
profund', ; ne Blubirdon eĉ
diru per vort'!

'11 Kaj ŝipestro ekstaris, jam
griza magrant', ; ŝtormo hurlis,
de lia2j lip;oj apenaŭ aŭdeblis
tremvoĉ' al gastigant': ; – Karl
ŝnurit' forgesiĝis sur ŝip'!)

& Marinjo Magdon:

< Rekante 33 el 61 batoj por strofo, entute 671 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Petr Bezruč. Baladigis Martin Strid (2016) per ĉeĥa popolmelodio modifita kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

(# Ej, lásko, lásko:

/hdolre mifa milre3 do mi3so sofa3 mimi; hdolre mifa milre3 do mi3so sofa3 mimi; fafa3 falso falmi3 re lala3 sofa mimi; fafa3 falso falmi3 re lala3 sofa mi;

(#Rekantaĵe: soso laso fa mi; rere remi fa lmi re; rere rere remi fa; somi mimi mifa so; laso laso fa mi; rere rere remi fa; somi mimi mifa so; laso laso fa mi)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 Ma2gdon malju2na el
Ostrava hejmen ; i2ris
vespe2re kaj haltis je brando;
falís e2n fo2son kun kap'
disrompita - ; hejme tre2
plo2ris Marinjo Magdon.

(×: **Vivo vigle rulas ; Fajro
flame bru2las ; Kion meti
por kuir? ; Orfoj ploras en
sopir' ; kaj malsato regas ;
Kion meti por kuir? ; Orfoj
ploras en sopir' ; kaj
malsato regas.**)

'2 Karbovagon' renversiĝis sur
relo, ; sub ĝi elspiris* vidvino
de Magdon. ; Orfoj kvin ploris
en Hamro Malnova, ; kaj pleje
plejaĝa Marinjo Magdon.

'3 Kiu nun ilin adoptos,
satigos? ; Ĉu vi por ili nun
estos gepatroj? ; Ĉu
minejestro la koron posedas, ;
kiel vi sama, Marinjo
Magdon?

'4 Finon ne havas markiza
arbaro. ; Kiam la patron mort'
trovas en mino, ; lignan
fasketon, ĉu orf' preni povas? ;
Pensas vi tion, Marinjo
Magdon?

'5 Frostas, Marinjo, kaj
mankas manĝaĵo. ; Plena
montaro de branĉoj kaj ligno. ;
Vidis urbestro vin,
Hochfelder, ŝteli, ; ĉu li
silentos, Marinjo Magdon?

'6 Kian fianĉon vi al vi
elserĉis? ; Plumon sur ĉap' kaj
pikilon ĉe brako, ; frunton
severan, kaj vikun li iras: ; ĉu
en Frydekon, Marinjo
Magdon?

'7 Strange vi amas lin. Kapo
klinita; viajn okulojn vi kaŝas
per tuko, ; kaj en ĝin fajraj
enfluas larmetoj. ; Kial vi
ploras, Marinjo Magdon?

'8 Burĝoj en Frydek kaj la
sinjorinoj ; mokos pri vi kun
mieno malica; Hochfelder
vidos vin tie en ĉambro: ; Kiel
vi fartas, Marinjo Magdon?
.....

'9 Flanke, Marinjo, rok' staras
tre kruta, ; fluas apude kaj
bruas rivero, ; ŝaŭma, sovaĝa
jen Ostravica. ; Ĉu vi ĝin
aŭdas, Marinjo Magdon?

'10 Salto maldekstren kaj ĉio
finiĝas. ; Via hararo kaptiĝis
sur roko, ; sango makulis la
blankajn manetojn, ; Di' kun
vi estu, Marinjo Magdon.

'11 En la tombejo ĉe muroj la
tomboj, ; krucoj kaj floroj sur
ili ne estas. ; Memmortigintaj
ĉi-tie nur kuŝas. Kuŝas eĉ tie
Marinjo Magdon.)

& Stinjeto stalservisto:

< Rekante 12 el 27 batoj por strofo, entute 675 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4424. Notita en Dalslando en 1885 (Bondessons visbok). El sveda tradukis Kukoletto (1993 strofojn '1,2,6,7,12,13-15,19,20,24,25 --o-e) kaj Martin Strid (2014 strofojn '3-5,8-11,16-18,21-23). Klarigoj (*): '2 Stinjeto: Eta Kristina. '15 Tel = tiel. '21 Na malced' = malcedon, malobeon. '23 Romo, sidejo de la papo kaj iam imperia ĉefurbo.>>

(#Melodio:

<1,7:27> (

/La LaTi dodo doTi LaTi LaSi MilFi; SiSi Ti La a; dodo dore mi mimi mifa mido Ti i;mi Si La Tido re doTi Ti La a

)×25)+

(&Strofoj:

'1 /Loĝis kampul' sur
Orientherbeja Sa2bl' ; ho
malgranda ; havis li filinojn,
filinojn kun agrabl'. ; En nia
stalo kaŝe ŝi servis.

'2 Li havis ja kvar, jes, li
ha2vis ja kvi2n

(×:; **ho malgranda** ;)
el ili Stinjeto* plej ĉarma la
filin'

(×:; **En nia stalo kaŝe ŝi
servis.**)

'3 Estis juna duko, elrajdas li
por ĉa2s' ekvidas li
Stinjeton dum sia preterpas'

.....

'4 Aŭskultu Stinjeto, por vi jen
mia vo2rt' Ĉu vi emas
servi en re2ĝa la kort'?

'5 Tranĉigu vi vestojn por vi
de kavalir' kaj servi
stalserviste vi serĉu dum forir'
.....

'6 Ĉe la kudristo2n iras
Kristinje2t' kudrigas
nobelvestojn novajn laŭ la pet'
.....

'7 Ĉe la ŝuisto2n iras
Kristinje2t' tranĉigas
nobelbotojn novajn laŭ la pet'
.....

'8 Stinjeto ŝi rajdas al reĝa la bien' Ekstere mem la reĝo li staras por ŝi jen

'9 Se stalserviston via moŝt' bezonas dum ĉi jar' mi emas reĝan korton servadi per ĉi far'

'10 Bezonas mi serviston plej urĝe en la stal' Mi nutros pri servisto sed ne lia ĉeval'

'11 Jen la juna duko, li staris apud li Se patro la serviston, ĉevalon nutros mi

'12 Dum tago ŝi rajdas ĉevalojn en herbej' dum nokto ŝi dormas ĉe l' duko en la lit'

'13 Dum tago ŝi kondukas ĉevalojn al la a2kv' dum nokto ripozas sur la duka brak'

'14 Strange grasiĝis nia stalservisto nu2n Ne povas li rajdi se varmas jam la sun'

'15 Strange dikiĝis nia stalservisto te2l'* Ne povas li alsupri ĉevalon en la sel'

'16 Stalservisto nia strangiĝis je humo2r' li ne povas boton de piedo tiri for

'17 Reĝo alparolas reĝinon per la buŝ' Alvoku nun istinojn du2 por akuŝ'

'18 Ne volas mi alvoki akuŝistinojn du sed mem volas iri mi por stala kontribu'

'19 Tra stala la pordo eniris la reĝi2n' Ŝtelire sub manĝujon Stinjeto kaŝis sin

'20 Disvolvas mantelon la blu2an la du2k' Sur tiu ŝi naskas la fi2lo2jn du

'21 La duko li falas je gepatroj al pie2d' Nun patron kaj patrinon mi faris na malced'*

'22 Reĝo al la duko, tiel parolis li: Stinjeto via, certe same bonas ŝi

'23 Ni faros geedziĝon plej grandan en ĉi dom' aŭdeblos ĝi eĉ ĝis porde2go de Rom'*

'24 Grafinoj kaj princinoj ploradis en kole2r' ripozas Stinjeto sur brako de la reĝ'

'25 Grafinoj kaj princinoj ploradis en inu2nd' ĉar prenis li por si la filinon de kampul')

& Laŭ ĉies plaĉo:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 473 paŝoj dum 6 minutoj, aŭ rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 682 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo (#Unuan 2015 kaj #Duan 2016).>

(#Melodio:

(#Unua: <:43> mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi doTi domi mido Ti Ti;re doLa doTi LaSi La La;

(#Rekantaĵe: mi domi so somi re do; fami doTi Lado Ti Ti; mido domi somi re; mi domi so somi re do))×11

?

(#Dua: <:31> o;mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi domi so somi re do; fami doTi domi re re; mido domi somi re e;mi domi so somi re do)×22

)+

(&Strofoj:

'1 (&Unua:

La /patro kun la juna filo ;
azenon portis al foiro. (×:;) La
patro en la selo sidis, ; la filo
la azenon gvidis.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ;
Gravas kion ili diru ; Kun
azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies
plaĉo ni iru.**)

(&Dua:

La /patro kun la juna filo ;
azenon portis al foiro.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ;
Gravas kion ili diru ; Kun
azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies
plaĉo ni iru.**)

La patro en la selo sidis, ; la
filo la azenon gvidis.

(×:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ;
Gravas kion ili diru ; Kun
azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies
plaĉo ni iru.**))

'2 Survoje venis hom'
renkonte, ; kaj tre indignis:
"Estas honte! Jen viro en
la sel' komforta, ; dum marŝas
la infan' malforta."

'3 La patro, je l' indigna voĉo,
; sin savi volis de riproĉo,
de la azeno do descendis ; kaj
rajdi sian filon sendis.

'4 Sed ree venis hom'
renkonte, ; kaj tre indignis:
"Estas honte! Jen knabo en
la sel' komforta, ; dum marŝas
la aĝul' malforta."

'5 La knabo, je l' indigna voĉo,
; sin savi volis de riproĉo,
do saltis de l' azena dorso. ;
Nun ambaŭ marŝis, sen
rimorso.

'6 Sed venis homo, miris
multe, ; kaj kriis: "Vere, estas
stulte! Dum vi lacigas vin
per marŝo, ; promenas la azen'
sen ŝarĝo."

'7 Do, kion fari? Patro, filo ;
demandis sin kun
maltrankvilo. Interkonsilis
kaj decidis: ; Nun ambaŭ en la
sel' eksidis.

'8 Sed ree venis hom'
renkonte, ; indignis ege:
"Estas honte! Sur povra
besto ŝarĝ' duobla! ; Fi, kia
kruelec' malnobla!"

'9 La du, en malesper', per
ŝnuroj ; l' azenon ligis ĉe la
kruroj, kaj ĝin per stango
traŝovita ; plu portis kun
klopodo ŝvita.

'10 Sed venis hom' kaj ĝis
eksceso ; ridante kriis: "Jen
frenezo! Azenon vivan oni
portas! ; Ho ve, mi de ridego
mortas!"

'11 La patro diris al la filo: ;
"Mi estas vere sen konsilo:
Ĉu la azenon do mortigi, ; aŭ
nin ĉe kol' sur branĉon ligi?"
.....)

& Pala procesio:

< Rekante 12 el 23 batoj por strofo, entute 690 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis K. Kalocsay (Streĉita kordo, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (/Mi DoDo MiMi DoMi FaMi ReeRe;Re SoSo LaLa Tido
TiLa SoSo;

(#Rekantaĵe: Mi DoDo MiMi DoMi FaMi Re; SoSo La TiSo
MiRe Do o)

)×30)+

(&Strofoj:

'1 Ho, procesio de knabinoj
palaj; ; Vizaĝoj flavaj kaj
malĝoj-vualaj.

(×: **Dum en la kampoj
kreskas heliant' ; ankaŭ ĝi
velkas en aŭtun'.**)

'2 En la sunbrilo de l' somer-
maten' ; Vi marŝas, marŝas
kontraŭ tag' de pen'.

'3 Atendas vin la kor-muelaj
horoj ; En la fabrikoj kaj en la
kontoroj.

'4 En lit' ĉifita restis la fiktiv' ;
De l' dolĉaj songoj... Jen la
viv' — la viv'!

'5 Funebra, longa, longa
procesio ; Je l' enterigo de la
iluzio,

'6 Je l'enterig' de ĝojo kaj de
ĉarm': ; Vidante vin mi luktas
kontraŭ larm'.

'7 La bruston peza vivo
senkompata ; Jen premas
plata, senespere plata,

'8 Ĝi klinas dorsojn, ŝtelas el
rigard' ; La artfajraĵon de la
juna ard'.

'9 Sur la vizaĝoj sidas trajt'
enua ; Kaj ĉe l' okuloj jam
sulketo frua,

'10 Sapiroj kuŝas en la kor'
kun sven', ; Sub pezaj ŝtonoj
de la taga pen'.

'11 Ho, orfaj floroj de l'
ĝarden' de Dio, ; Vin ne
vizitas gaja papilio,

'12 La papilio de la hor' de
am'... ; Burgone velkas via
florornam'.

'13 Ho kiel volus mi kun krio
voka ; Elŝiri vin el brak' de l'
urb' sufoka

'14 Kaj gvidi vin en kanta,
danca rond' ; Sur la deklivon
de sunbrila mont'.

15 Sur viajn harojn ŝuti
kampoflorojn ; Kolorojn
pruntu ili kaj odorojn.

'16 Rigardojn viajn ĵeti al ĉiel':
; Sin banu ili en la blua hel'.
.....

'17 Kaj vin aspergi per radioj
sunaj ; Vin ili kisu sanaj,
ruĝebrunaj.

'18 Stariĝi sur la pinto de l'
dekliv' ; Kriante: iru, ĝoju al la
viv'!

'19 Kaj pluv' de ĝojo el ĉiel'
sennuba ; En brusto seka,
sarkherbaĵa, duba

'20 Ĝermigas riĉajn spikojn de
la fid' ; Sonorilflorojn de l'
perlanta rid'.

'21 Vi dancas, sur la kapoj kun
festonoj ; Turnante ronde vin
je flutosonoj.

'22 Dum tikle, dolĉe vibras en
la spin' ; La ebrieto pro l'
miela vin'.

'23 Aŭ vi sur branĉoj vin
balancas kuŝe, ; Fruksukojn
dolĉajn sorbas plenabuŝe,

'24 Ĝis vin al sorĉaj kampoj
logas for ; La papilio de la
ama hor':

'25 Pel-ludi, rifuĝante de l'
sopiro, ; Petole kiel nimfo kun
satiro,

'26 Spirege fali kaj kun ĝoja
trem' ; Kapitulaci al la
ĉirkaŭprem',

'27 Dum viajn kisojn per foli-
susuro ; Fluŝtante benas la
Patrin-Naturo... ..

'28 Ho plen' de l' vivo! Ho
triumfa Jes! ; La viv' Donaco
estas kaj Promes'!

'29 Ekpalas, falas, mortas
iluzio ; Kaj marŝas, marŝas
pala procesio... ..

'30 Okulangule gutojn du de
plor' ; Mi viŝas honte, kun
senpova kor'.

& Kion la vivo alportis:

< Rekante 38 el 77 batoj por strofo, entute 693 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof poemojn unuan (Bohema Revuo Esperantista, februare 1911) kun dediĉo "Al mia juna franca amiko, sinjoro J. Bordes en Saint Chamond" kaj moto "Aferojn kaj dezirojn ĉiuj havas – mi ankaŭ, la mizera, iros fari aferon mian... (El "Hamleto".)" kaj duan (De Avondpost, s-Gravenhage, Nederlando, 1911 aprile 1-an) kun moto "Venos tempo, en kiu aro da bonaj homoj Vin ŝatos Komenio, eĉ farojn, eĉ esperojn Viajn, eĉ ankaŭ dezirojn. G. W. Leibnitz 1671". Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:77> (mimi mimi mire redo doLa; SoSo SoSo dodo rere rere;
mimi mimi mire redo doLa; SoSo SoSo dodo rere La La; mimi
mimi mire redo doLa; SoSo SoSo dodo redo La La; SoSo SoSo
dodo doSo La La;

(#Rekantaĵe: re re rere redo doLa; SoSo So Sodo re re; re re rere
redo doLa; So So Sodo re re; mi mi mire redo doLa; SoSo do do
redo La La; mi mi mire redo doLa; SoSo do do redo La La a)

)×9)+

(&Strofoj:

,& Sur nova vojo:

'1 /Ĵus mi rememoras tiun
tempon, ; kiam mi ekaŭdis
antaŭ jaroj, ; ke en mondo ie
iu homo ; lingvon ian novan
publikigis, ; kaj ke tiu stranga
idiomo ; alkondukos homojn
trans la baroj, ; kiujn la
miljaroj amasigis.

(×: **Vento blovas sur ĉielo ;
portas freŝan aeron ; Vento
de la verda stelo ; karesas la
teron ; Granda kaj genia
menso)×2 (; portis al ni
novan penson.)×2)**

'2 Senpripensa tiam mi rimarkis ; la aferon sole unu fojon, ; sed ne multe tion komprenante ; mi forpelis ĝin el la memoro, ; ne ankoraŭ tiam divenante, ; ke mi iam sekvos saman vojon ; kaj ke sangos por ĝi mia koro.

'3 Tiam ankaŭ mi apenaŭ sciuis, ; ke alvenos noktoj sen la dormo ; kaj la tagoj plenaj je la nuboj, ; plenaj je doloro kaj sen fido, ; ke esperon sekvos ĉiam dubo ; kaj ĥimeroj de plej stranga formo ; ke min persekutos kun ekrido.

'4 Do mi ne bedaŭras tiun ŝanĝon. ; Iru nur aliaj sur la vojo ; glata, bela, simpla, oportuna! ; Min allogas ĉiam nur la baro, ; kiu staras antaŭ mondo suna ; kaj sur tiu baro kun la ĝojo ; mi batalos gaje por idaro.

,& J. A. Comenius:

'5 Ĉu Vi konas malgrandetan urbon, ; kiu ĉe Vi, ie en la Nordo ; kuŝas dolĉe ĉe la mara bordo? ; Naarden estas ĝia simpla nomo ; kaj en tombo tie sub la tero ; songas dolĉan sonĝon sen sufero ; sanktaj restoj de l' plej bona homo.

'6 Se Vi konas urbon Vian; kaj Vi tien venos per okazo, ; mi, Sinjor', Vin petas kun emfazo, ; lin vizitu en libera horo. ; Por la samaj celoj idealaj, ; kiujn ni nun sekvas, plej kristalaj, ; batis ankaŭ lia bona koro.

'7 Kiel Vi kaj mi, li ankaŭ songis ; en la verkoj belaj sen komparo ; pri la unueco de l' homaro, ; pri eterna kaj senĉesa paco; sed al li kaj lia flama vorto ; malfavora estis viv' kaj sorto, ; - sur la tero mankis por li spaco.

'8 Sed li fine trovis la trankvilon ; kaj kun sia sonĝo ĉarma, granda, ; en malgranda urbo nederlanda ; dormas tiu nia antaŭulo ; kaj sur lia tombo, jam sen larmo, ; kantas nune nur la birda svarmo ; kaj ekfloras simpla konvolulo.

'9 Se Vi tien venos, mi Vin
petas, ; diru al li, ke en lia
lando ; estas nune viva
propagando ; por la songo lia
filozofa, ; ke en kor' de multa
jam Bohemo ; gaje kreskas lia
bona semo ; en la form' de
lingvo Zamenofa.)

& El Ahasvero de amo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 696 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis K. Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/mi mire re do dodo dore mimi; mi mire mi mi; soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×24)+

(&Strofoj:

'1 Jen sidas ŝi kun lipoj
kunpremitaj, ; Li: kun okuloj
dronaj kaj meditaj.

(×: **Bruas danco en halo,
dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas
ni en esperanto-kunven'.**)

'2 Silento. Tra l' ĝarden' la
vent' aprila ; Balaas en la
posttagmezo brila

'3 Foliojn postrestintajn de
aŭtuno, ; Kiujn ne vekos el la
mort' la suno.

'4 Li movas sin kaj ŝi ekspiras
ĝeme, ; Kaj ree regas la silento
preme.

'5 Kaj en okuloj, kun brilado
febra ; Al ambaŭ nun aperas
larm' funebra.

'6 Funebros li l' Estinton
ĝojofontan, ; Funebros ŝi l'
Estonton ne estontan.

'7 El la ĝardeno brila,
alfluginte, ; Envenas la Estinto
piedpinte.

'8 Ho, temp' ebria de la amo
juna, ; Duopoj dolĉaj en la
laŭbo luna,

'9 Konfesoj, ĵuroj, kisoj, ĉio
multa, ; Mistera, rava, flirta,
dolĉe stulta!

'10 Jen, jam el ĉio restis nur
memoro, ; Libre premita floro
senodoro.

'11 Ho, kial ĝermas floro, se ĝi
falas, ; Amor' la vangojn kial
forvualas,

'12 Svenema amo kial sin
ekmovas ; En kor'? Kial la
am', se ĝi ne povas

'13 Eterne daŭri? Ŝi ekspiras
ĝeme ; Kaj li kapkline, mute,
kompateme,

'14 Kun larme ama sento ŝin
rigardas, ; Sed en ĉi sento amo
jam ne ardas.

'15 Ho, bone estus kun iama
brulo ; En brakojn kapti ŝin
por dolĉa lulo,

'16 Karesi al ŝi tra l' harar'
konsole, ; Forkisi larmojn de l'
okuloj mole,

'17 Sed braketendo nur
mensoga pozo, ; Kaj kis'
konsola estus nur almozo.

'18 Ne, nepovante doni tutan
koron, ; Li ja ne faros tian
malhonoron

'19 Al eksreĝin' de ĉiu revo
sia: ; Nur sidas li en mut'
melankolia.

'20 Silento longa, langa,
longa, prema... ; Stariĝas li
kun movo hezitema.

'21 Nenia vorto, nur mallaŭta
ĝemo, ; Rideto pala, larma.
Manopremo.

'22 Mankiso. Star' konfuza,
sendecida. ; Rigidaj kruroj.
Nun, ekir' rapida.

'23 Sur ŝtupoj. Halto! Ne. Li
iras plue. ; En koridor' la paŝoj
sonas brue.

'24 Silento. Li foriris sen
reveno. ; Ŝi kaŝas siajn
vangojn en kuseno.)